**Leksikaj kaj gramatikaj nutraĵoj kun Quizlet**

KAFO
La kafo estas en taso DE kafo.
Ni mendis en la restoracio du tasojn DA kafo KUN sukero kaj kremo. Ni mem metas la sukeron en la kafoN kaj kirlas la tuton PER la kulereto.



LAKTO
Ĉu vi trinkas la lakton malvarmA aŭ varmA?
Mi certas, ke vi faras tion trankvilE kaj komfortE.



LEGOMOJ
Tomato, karoto, kapsiko, kukurbo, fungo estas legOmoj. Kelkaj personoj erare uzas la vorton legUmoj. Vi ne faras tion, ĉu?



PANO - preferas
Mi manĝas ne tro da pano kaj fakte PREFERAS la brunaN panoN AL la blanka.



ŜINKO
Speco de viando, kiun ni manĝas fumitA, kuiritA, eĉ kelkfoje krudA.




SUPO
Sur la bildo vi vidas supon, fakte teleron DA supo en telero DE supo.



TERPOMOJ
Ili havas ankoraŭ ŝelon. Necesas senŝeligi ilin.




VIANDO
Prenu la nomon de la besto kaj aldonu la sufikson -AĴ. Bovaĵo, porkaĵo, kokidaĵo, ŝafaĵo.



ALERGIO
Mi havas alergion kontraŭ monosodium-glutamato (MSG), sekve mi ne povas manĝi en aziaj restoracioj, kie oni amase uzas tiun gustofortigilon kune kun la salo.



BOTELO
Jen estas kelkaj malnovaj boteloj. Ili estas malplenaj. Ĉu temas pri boteloj DE vinagro aŭ alkoholaĵo?



FORKO
Viandon manĝu PER forko kaj tranĉilo, supon PER kulero. Ili estas manĝiloj. Sed kion uzas ĉinoj kaj japanoj?



FROMAĜO
Kutime la fromaĝojn oni faras el kazeigita bovina, kaprina aŭ ŝafina lakto per fermentado, ŝimigo aŭ kuirado. La fama prezidento Charles de Gaulle plendis foje 'Kiel eblas regi landon kun 365 fromaĝoj?'



Mi malkovris retejon kie oni povas produkti lerncelajn vortokartojn uzante difinojn, aŭ ankaŭ fotojn, sonojn kaj poste en la reto fari diversajn ekzercojn pri ili, testi sin, ekzerci sin pri la vortoj kaj esprimoj.
La kartojn eblas printi kiel liston aŭ eĉ kiel faldeblajn kaj enplastikigeblajn vortokartojn.

Sur la sekvaj paĝoj vi povas vidi unu el tiaj miaj provoj.

Jam multaj uzis tiun programon, sed ne ĉiuj materialoj estas seneraraj aŭ utilaj.
Zorgeme faru vian elekton.

Esperanto-temaj kartoj : http://quizlet.com/subject/esperanto/

Gerda malaperis : kartoj laŭ ĉapitroj aŭ tuta kolekto kun ĉina traduko.
http://quizlet.com/subject/gerda/

Interesan kolekton kreis (ankaŭ en Esperanto) la uzanto *frimmin*
http://quizlet.com/user/frimmin/

Miaj subaj kartoj kun ekzercebloj:
http://quizlet.com/10523051/mangajoj-por-digesto-meznivela-flash-cards/

Se vi sukcese faris kelkajn proprajn kartojn, bv. Indiki ilin en nia FORUMO.

http://edukado.net/komunumo/forumo?f=297&p=1